

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protaktantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, advok., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Noria, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 177
3. 2. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro
aŭ 0,50 sv. frk. por landoj, kies valuto
suficis maksimume 50%; por ĉiuj aliaj
landoj 0,05 dol. aŭ 0,25 sv. frk.

Anonprezo

po kvadrata-centimeiro egalvaloro de
0,20 sv. frk. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. frk.),
en „Internacia Komercio“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

La Deksesa de la 6—14 aŭgusto. — Kunvenoj de UEA kaj K.R. en Genève dum aprilo.

Reĝo Alfonso XIII

honora protektanto de la II-a Kongreso de Iberiaj Esperantistoj.

La Deksesa.

Multaj samideanoj de post kelka tempo senpacience atendas informojn pri la Deksesa. Hodiaŭ ni fine povas publikigi la ĵus ricevitajn unuan bultenon de la Loka Kongresa Komitato.

Unua bulteno.

La esperantista gazetaro kaj ankaŭ kelkaj nacilingvaj jurnaloj jam raportis pri la decido de la Centra Komitato en Paris dum septembro 1923-a, okazigi la XVI-an Universalan Kongreson de Esperanto 1924 en Wien (Aŭstrujo).

La Konstanta Kongresa Komisiono (K.K.K.), interkonsente kun la lokaj organizoj esperantistaj en Wien aprobis dum oktobro kaj novembro 1923-a la al ĝi proponitan nomaron de la Lokaj Kongresaj Komitatoj (L.K.K.).

Nun la L.K.K. dissendas la oficialan inviton al la XVI-a, kiu — 12-paĝa — enhavas krom ĝenerala saluto al la tutmonda esperantistaro kelkajn sciigojn pri la kongresurbo Wien kun vidindaĵoj en tiu urbo kaj la unuan raporton pri ĝis nun anoncindaĵoj preparaj laboroj por la kongreso.

Aligilo almetita kaj resendota de la ricevinto al la L.K.K. prezentas kofiz-tabelon preskaŭ egalan kun tiu por la XV-a en Nürnberg. Specimenoj de la oficialaj salutmarkoj estas eldonitaj, ankaŭ speciala respondo.

Kiu ankoraŭ ne ricevis inviton, tuj postulu ĝin sub la simpla adreso:

Esperanto-Kongreso Wien, Aŭstrujo.

La Loka Kongresa Komitato.

Schade, ĉefsekretario.

El la malgranda Aŭstrujo tuj aliĝis al la XVI-a ĝis mezo de januaro 440 gesamideanoj.

Kunvenoj de UEA kaj K.R. en Genève.

Malgraŭ la malfacilaj cirkonstancoj en multaj landoj oni povas konstati kun kontenteco, ke spite de tio la laboremo kaj fervoro de nia gesamideanaro ne ĉesas. Novaj projektoj devas esti plenumataj. La planoj devas esti preparotaj. Oni do povas gratuli al UEA kaj K.R. pro ilia iniciatemo kaj deziri anticipe plej bonan sukceson al la entreprenado. Ni represas jene informon laŭ „Esperanto“ de UEA.

Por diskuti la rimedojn por pli intima kunlaborado inter UEA kaj naciaj societoj la Centra Komitato kunvokos specialan komunan kunvenon de ties reprezentantoj ĉe la Centra Oficejo de UEA en Genève, la 20-an de aprilo, tuj post Pasko, tiamaniere ke ĝi povu raportii jam dum la Vienna Kongreso pri la necesaj paŝoj por koncentrigi niajn fortojn.

Aliparte necesas apliki diversajn decidojn de la Venezia Konferenco. Nia amiko s-o Edmonds, kiu reprezentis tie la Londonan Komercan Ĉambro, sukcesis starigi komitatojn de britaj komercistoj, kiu jam komencis la rezulton de la konferenco al pluraj miloj da Komercaj Ĉambroj eksterlande. En Paris fondiĝis la societo „Esperanto et Commerce“ kaj la Parisa Komercia Ĉambro akceptis partopreni en komisiono por aranĝi eks-

perimentan instruadon de nia lingvo al diverslandaj komercistoj, laŭ invito de la Brita Komitato.

S-o Edmonds, nun ankaŭ sekretario-kasisto de K.R., bezonas interkonsenti kun la naciaj societoj pri tiu afero kaj invitos ilin, ke ili sendu delegitojn al Genève por tio. El Paris venis peto, ke oni atendu la venontan jaron por organizi konferencojn en tiu ĉi urbo kiam nova registaro estos pli favora.

La Komercia Komisiono de UEA do ankaŭ kunvenos en Genève samdate kaj UEA kunvokos ankaŭ siajn komitatojn, delegitojn kaj subtenatajn membrojn por eksterordinara kunveno pri la apliko de la Venezia rekomendoj koncernantaj la servojn de UEA kaj pri la necesaj rimedoj por plifortigi la asocion.

Kiu intencas partopreni bonvolu jam tuj informi la Centran Oficejon en Genève, Bd. du Théâtre 12.

II. Kongreso de Iberiaj Esperantistoj en Bilbao.

Oni decidis okazigi en Bilbao la II-an Kongreson de Iberlandaj Esperantistoj kaj la jam elektita Organiza Komitato vigle kaj entuziasme laboras por ĝin sukcesi.

Oni eldonas ĉiusemajnan bultenon (esp. kaj hisp. verkitan) por prepari, anonci kaj sukcesigi la Iberian Kongreson. Ĉiuj gazetoj ĝin ricevontaj estas kore petataj represiĝi la oficialajn komunikojn de la kongreso.

La reĝa moŝto Alfonso XIII bonvolis akcepti la honoran protektoraton de nia kongreso. — La magistrato de la urbo donis subvenciojn de 250 pesetoj.

Luis de Otaola, Aurreches 4—4, dch. Bilbao (Begoña).

Socia Vivo.

Socialaj studoj.

Efektiva kaŭzo de militoj.

Ni publikigas hodiaŭ ankoraŭ rezonon al la artikoloj pri tiu ĉi temo klarigante la problemojn laŭ laŭdoj de anoj de la angla movado „Eksterdondismo“ (Kibbo Kift). Krome ni aldonas artikolon pri la problemoj laŭ la vidpunkto de la biblio-studantoj. Responde artikolo de la unua aŭtoro poste lingvos la interesan serion.

Respondo de J. W. Leslie, London.

Al la tre interesaj artikoloj mi volas diri miajn ideojn kiel ano de la Arbarisma Parenaro, Kibbo Kift.

La militado estas nacia malsano kaŭzita de diversaj malbonaj cirkonstancoj kaj kondiĉoj same kiel ĉe individua homo la kolero, netoleremo, malbonhumoro, estas malsanoj kaŭzitaj de kontraŭnaturaj cirkonstancoj kaj kondiĉoj.

Oni trovas ke tiuj nacioj kiuj plej emas militadi estas tiuj en kies landoj ekzistas la plej malbonaj kondiĉoj de vivado kaj laborado. En la grandaj industriaj kaj komercaj landoj la plejmulto de la homoj devas labori longajn horojn en malsanaj fabrikejoj kaj oficejoj kaj dormi, tro ofte, en malhigienaj domoj. La rezulto estas, ke ĉiutage kreskas la bezono de pliaj hospitaloj, frenezulejoj ktp. — sed kion oni faras por aliĝi ĉi-tiujn aferojn? En tiuj landoj la homoj havas malmulte da libera tempo por vivi sanan vivon kaj sin okupi pri aferoj sanigaj al korpo kaj menso. Iliaj ideoj kaj interesoj estas fariĝintaj por ili de la grandaj jurnaloj kaj hodiaŭ ili preskaŭ ne povas pensi per si mem. Ilia edukado

estas tiel malsufiĉa, ke la ĵurnalistaro devas verki siajn artikolojn en mallongaj frazoj. La nacioj en tiaj landoj vivas tiel malplanan, sencelan vivon, ke ili bonvenos la okazon de milito — ĝi estas ŝanco je ŝanĝo kaj ili safe kuras obei la ordonojn de la maljunaj regantoj, kiuj cedas al la malsano de milito.

La individua homo devas porti la kulpon de ĉiu milito kaj tial la solvo de la problemoj estas en la mensa kaj korpa kuracadoj al la individua homo.

La plej pacema, kontenta homo estas tiu, kiu estas korpe kaj mense sana. Li pensas pli larĝe kaj klare kaj agas pli racie. Kiam sana homo volas solvi disputon, lia lasta rimedo estas batali, dum malsana homo ĉiam emas batali unue kaj pensi poste.

Tial la unua neceso por pacigi la militemulojn kaj kuraci la nacian malsanon estas, aliĝi la vivkondiĉojn kaj menskondiĉojn de la individuaj nacioj. Ĉi tiun rimedon propagandas la plej nova Paco-Movado, Kibbo Kift. La unua devo de ĝiaj anoj (en multaj landoj) estas, vivi en sanaj kondiĉoj eksterdome kiel eble plej ofte por havigi sanajn korpojn. Ankaŭ ĝi igas ĝiajn anojn uzi la manojn kaj okupi sin pri utilaj metioj kaj aferoj. Ĝi starigas „Arbosuprojn“ (familiajn grupojn) kies infanoj estas edukitaj laŭ sanaj arbarismaj metodoj; tiamaniere estos starigita nova raso de homoj, kiu estas sana korpe kaj mense. La anoj de Kibbo Kift rifuzos deĵori en iu ajn milito, ĉu enlanda, ĉu eksterlanda.

Kompreneble la pacoprogramo de K.K. ne konsistas nur el la akiro de sana korpo. Ĝi estas multe pli ampleksa kaj detala. Sed mi skribas nun pri ĉi tiu punkto, ĉar ĝi estas unu el la plej gravaj — kiun neniu alia paco-movado ĝis nun pritraktas.

Respondo de Alfred Egg, Rieden b. Baden, Svisujo.

Kun granda intereso mi legis la artikolon sub ĉi-supre menciita sama titolo en n-oj 165/166 de ET. Pleje kontentigis min, ke la aŭtoro menciis tiel la parabolon en la Biblio, ke la homaro iam efektive „reforĝos glavojn je plugiloj“ kiel ankaŭ la esencan de nia Esperanto-himno. Kaj pro plena konvinkigo mi konfesas, ke ambaŭ plenumiĝos, ne iam poste, sed jam post ne multaj jaroj.

Eĉ homoj ne kredantaj pri la Biblio emas diri, kiam pro ili aŭ aliaj okazas eraroj aŭ malsukcesoj, ke ni ja ĉiuj estas malperfektaj. Kaj estas vere bone tiel. Ĉar ni konkludigas, ke nia malperfekteco devas baziĝi sur kaŭzo. Sed kian rilaton nia temo „Efektiva kaŭzo de militoj“ povas havi kun la fakto de nia malperfekteco? La kredo de la satataj legantoj estu iel ajn. Kiel mi, tiel multaj aliaj kredas je ekzisto de Kreinto de ĉio. Se ni nun kiel bazo de nia studo akceptas la Biblion, oni konstatas, ke la homo estas kreita de la Kreinto perfekta. El la averto, ne manĝi de la frukto de la arbo enmeze de la ĝardeno Edena ni ekkonas, ke malobeo estas sekvitata de puno. Kaj tiu ĉi puno nomiĝis simple „morto“. Rezultigas, ke obeado signifis neŝanĝo de la stato, en kiu la homo troviĝis. Laŭ tio ni povas konvinkite diri, ke la unua homo ankoraŭ nun vivus en paradizo sur la tero, en perfekteco. Kiam la Kreinto kreis la unuan homon, milito ne povis esti, nek povis ekesti milito iam ajn poste,

se la unua homo ne estus malobeinta kaj same ne la tiam perfekta naskiĝonta idaro. Tiam ĝis nun neniam estus estinta milito, ĉar pri la Kreinto ja estas raportita, ke li estas la Amo, kaj la kondiĉo al la kreitaĵoj logike ree nur povas esti amo, amo reciproka. Se do la homo estus restinta obee kontraŭ la Kreinto, li per tio estus montrinta la amon, kiun dignigis Dio. Sed en la momento de malobeo tuj komencis plenumiĝi la kondamnigo, la homo ne sole defalis de homa perfekteco, sed ankaŭ iom post iom alproksimiĝis al la morto. Krom tio li pli kaj pli degeneriĝis kaj la leĝo de amo, kiu prae estis en la koro de l' homo, pli-malpli estingiĝis. La sekvoj de tio estis, ke la homaro ne nur grandparte forgesis la Kreinton kaj forgesis ami lin, sed ke ili ankaŭ komencis sin mem ami, ili egosimiĝis. Kaj laŭ mia konvinkigo jen kuŝas la sole vera kaŭzo de militoj, ĉar ĉiuj kapitalistoj, ĉu homaj registaroj ĉu regnaj potencoj, ĉu militistaro estis en la pasinta tempo la kaŭzo de militoj, ili estis la produktaj de la malobeo de l' homo kontraŭ la Kreinto. Se la homaro de pratempo ĉiam estus praktikinta amon kontraŭ Dio, tiam ĝi ne estus permesinta al ili uzurpi siajn kunhomojn, ĉar amo al Dio estas samsignifa kun amo kontraŭ la najbaro. Do neniam estus ekestiĝintaj kapitalistoj. Kaj same la konservado de amo kontraŭ Dio kaj la najbaro ne estus aperiginta homajn registarojn, ĉar tiam ja ĉiuj homoj estus konsiderintaj la Kreinton kiel alian reĝon, al kiuj ja ĉiuj tutenime estus servintaj. Sed restado en amo kontraŭ la Kreinto kaj la najbaro finfine ne estus ekstariginta militistaron. Resume: pro oboe, pro ekzercado de amo al sia Kreinto nek kapitalistoj, nek homaj registaroj aŭ regnaj potencoj nek militistaro estus aperigintaj kaj tial ankaŭ ne militoj. Ripete: la sole vera kaŭzo de militoj estas la malkonsidero de ilia Kreinto, kion pruvis la unua kiel ĉiuj aliaj postaj homoj per kontraŭamaj agoj. La nuntempaj cirkonstancoj kaj mizero en la mondo ja nun estas rezultato de tio.

II.

Kredo je malapero de militoj.

Se la Biblio pri la ĝis nun dirita pravigaĵo, ĉu ĝi apogas la esperon kaj kredon je malapero de militoj? Ĉu ĝi montras la rimedojn en tiu direkto? Je ambaŭ demandoj mi povas respondi per konvinkita „jes“. Strange kaj mirinde harmoniaj kun la esenco de la esperanta himno estas jenaj profetaĵoj, el kiuj unu parto jam estas citita: „Kaj li — la Eternulo — juĝos inter multaj popoloj kaj juĝparolos al multaj nacioj ĝis malproksime... Kaj ili reforĝos siajn glavojn je plugiloj, kaj siajn lancojn je tranĉiloj de vinberkultivistoj; jam ne nacio eklevos la glavon kontraŭ nacio, kaj ili ne plu lernos militadon, kaj: „La fervora alsiropo de la kreitaro atendas la malkaŝon de la filoj de Dio... La tuta kreitaro kune ĝemas...“ La unua frazo respondas la unuan, kaj la dua la duan demandon. Tamen la respondo je la unua demando nur estas akceptebla kaj kredebla, se la dua demando

respondiĝas per logika argumentado. Se la morto estas la konsekvenco de malobeo kontraŭ la ordo de Dio, kaj se la unua homo antaŭ ol naskiĝi idaron, pro malobeo malperfektiĝis; tiel ke la idaro herede fariĝis malperfekta, tiam estas logike kaj samtempe instruo de la Biblio, ke ekvivalentaĵo sole povas reapertiĝi tion, kio estas perdita. Kiu povas kredi, ke la Kreinto kreis homon, tuj ankaŭ povas kredi al la raporto de la Evangelio de Johano, kiu en la unua ĉapitro klarigas, ke la unua senpera kreitaĵo de la Kreinto estis la vorto, greke: *O Logos*, en spirita sfero, kiu estis de tiam la „laborestro“ de la Kreinto t.e. kiu elfaris la volon de Dio, per kiu kreiĝis ĉio, kio estiĝis. El la homa idaro ne povis naskiĝi ekvivalenta, t.e. perfekta homo, kiu anstataŭ la unua homo savis kaj revivigis ĉiujn homojn deŝt Adamo ĝis nun. Tial, estante en harmonio kun la Kreinto, la Vorto oferigis kaj kaj estiĝis, kaj de tiu nur estis transportita per la sankta spirito de Dio en la naskiĝinta Jesuo la identeco. Nur per la naskiĝo pere de la sankta spirito de Dio anstataŭ pere de homa volo Jesuo naskiĝis kiel perfekta homo, kiu estis iam Adamo. La ekvivalente estis prezentita per fordonco de la vivo nekondamnita al morto. Per tio estis metita la bazo por la reperfektiĝo de la homa gento. Sed Jesuo Kristo por ne nulligi la havigitan ekvivalentaĵon ne povis plu revivigi karne. Tial Dio, kiu kreis Adamon, en sia ĉiopotenco relevigis Kriston Jesuon kiel spiritan estaĵon. Li altiĝis lin pli alten, ol li estis iam kiel *O Logos*, li donis al la unua el la relevigintoj Dian naturon, kiu distingiĝas jene: Kiu havas Dian naturon, tuj povos doni vivon al aliaj: kiu ne havas Dian naturon, tuj estas ricevanto de vivo t.e. li estas dependa de alia. Jesuo, ĉar li amis Dion spite ĉiujn kontraŭajn influoj, estis persekutata sur la tero ĝis krucumiĝo. La Evangelio proklamas, ke bone plaĉis al Dio, elekti al Kristo Jesuo frataron el ĉiuj lingvoj, gentoj kaj popoloj, kaj ankaŭ ili distingiĝis per persekutado kaj mokado pere de aliaj. Sed al tiu ĉi elektitaro, greke: *ecclesia* (esp. eklezio) estas promesita same kiel al ilia Majstro Dia naturo. Kiam ili ĉiuj plennombre pruviĝis indaj, tiam tuj post la morto de la lasta el ili, plenumiĝos la esenco de la Esperanto-himno, t.e. la fervora alsiropo de la kreitaro al la malkaŝo de la filoj de Dio. Ili, la elektitaro, la filoj de Dio, tiam kune kun la Reĝo de la reĝoj, kaj Sinjoro de la Sinjoroj ekstarigos la reĝon de Dio sur la tero, kaj tiam, laŭ la preĝo de kristanoj, okazos la Volo de Dio, tiel sur la tero, kiel en la ĉielo. Tiam alesos la tempo, kiam la glavoj estos reforĝataj je plugiloj kaj la militoj por ĉiam kaj eterne malaperos. Tiam ĉiuj mortintoj deŝt Adamo ĝis nuntempe estos revivigataj kaj reperfektiĝataj je eterna vivado sur la tero, kaj tiam amo al la Kreinto kaj al la najbaro estos ĉies elkora motivo por ĉiu bona ago.

Mi jam aludis, ke la tempo jam ne estos malproksima, kiam la militoj malaperos. Kiam tio kazos? Ree la Biblio klare informas. Mi rekomendas al ĉiuj, foje atente legi la Evangeliojn de


Mateo, ĉapitro 24, versoj 7 ĝis la fino, Luko 21, versoj 10 kaj sekvantaj, kiel ankaŭ la profetaĵoj de Daniel, 12-a ĉapitro. Ĉu ne ĉio tie menciita plenumiĝas antaŭ niaj okuloj? Tial ni vivas ja je la fino de tiu ĉi mondaĝo, je kiu malaperiĝas la ĝisnuna maljusta socia ordo de sur la tero. Kaj feliĉe, je tiuj ĉi mizeraj cirkonstancoj sekvas eterna periodo de feliĉeeco, paco kaj justeco. Kiu el la legantoj interesiĝas pli pri tiu venonta ora epoko de la homaro, laŭ miaj ĉi-jene donitaj klarigoj, tuj legu interesan Esperantlingvan libron: „Milionoj, kiuj nun vivas, neniam mortos!“ Mi donos volonte pluajn informojn.

Aktuala politiko.

Lenin.

En la lasta numero de ET estas raportita pri la subita morto de Lenin (Uljanov), unu el la ĉef-personoj de nuna soveia Rusujo kaj la spirita gvidanto de la tuta komunisto movado.

En ĉiuj komunistaj rondoj de la tuta mondo, kie la sciigo pri la morto kaŭzis grandegan ĉagrenon, okazis memorkunvenoj kun la unu-anima konfeso daŭrigi la laboron laŭ la spirito de Lenin



La reprezentantoj de arego da potencoj sendis kondolenc-esprimojn. El Roma oni telegrafas, ke eĉ la pontifika afergvidanto kardinala ŝtatssekretario Gasparri esprimis persone al la sovet-rusa reprezentanto en Roma Jordanski la kondolencen de l' papo.

Interesaj estas la detaloj el la vivo de Lenin. Lia kariero komenciĝis en 1887, kiam la deksepjara studento de la imperiestra rusa universitato en Kazanj liĝis Uljanov kune kun sia patrino forlasis la malliberejan ĉelon, en kiu troviĝis la frato de li Aleksandro pro atenco kontraŭ la caro. Aleksandro punita je morto estis amnestiata, kondiĉe, ke li rezignus pri siaj revoluciaj projektoj. Por influi lin, oni venigis al li la patrinojn kaj la fraton liĝis. Sed sensukcese. Aleksandro preferis morti kiel revoluciisto kaj la postan tagon okazis la ekzekuto. Depost tiam mensa ŝanĝo

Ĉe la sarkofago de la Faraono.

Post penigaj antaŭlaboroj oni nun sukcesis, veni ĝis la sarkofago de l' faraono Tut-Ank-Amon, kiu oni trovis tute netuŝita.

La raportisto de la „Times“ donas pri tiu ĉi granda momento impresivan raporton:

Je la 3-a horo ĉiuj malsupreniris en la tombon. Estis momento, kiun la partoprenintoj ne baldau forgesos. Jam du tiaj grandaj momentoj estis estintaj en la pasinta jaro; la unua, kiam la tombo estis malfermita la unuan fojon, kaj oni ekvidis neatendite la amasigitajn mirindaĵojn de la antaŭĉambro; kaj la dua, kiam oni estis disrompinta la sigelitan pordon kaj videbligis post ĝi la granda, orumita, blua fajenco-ŝranko, kiu kaŝetis la veran trezoron, la tombejon. Nun tuj ĉi ŝranko bone gardinta dum tiom da jarcentoj la sekretojn estas forigita. Unu granda momento, la plej granda el ĉiuj, ankoraŭ atendas la elfosistojn: kiam la kovrilo de l' sarkofago estos levita, kaj oni estos vidanta la reĝon en la soleneco de l' morto. Sed tiun ĉi lastan okazaĵon oni devas pacience atendi.

Kiam ni tra la antaŭĉambro malsupreniris en la tombon, al ĉiuj la koroj pulsus pli rapide, ĉar ni estis farigitaj atesiantoj de okazaĵo, kiun travivi neniu homo de l' nuna tempo havis jam okazon.

Kvazaŭ interkonsentite ni parolis malmulte, kaj reciprokaj sciigoj okazis en respokinda frustrado. Kiam ni staris en la mallarga trajnejo al la tomboĉambro, brilis antaŭ ni la granda, orumita ŝranko kun sia belega ornamo de sanktaj signoj kaj lumantaj fajencoj. Ĉar la pordoj de la unua ŝranko estis forigitaj, ni nun vidis la pordojn de l' dua ŝranko en tuta larĝeco antaŭ ni, tute orumitaj kaj plene kovritaj per enskulptitaj reliefsenoj, kiuj montras Tut-Ank-Amon en diversaj pozoj dum la preĝado al la dioj. Malsupre kaj supre la pordoj estis fermitaj per

euraj rigliloj, kaj en la mezo estis fiksita per ŝnuroj bronzaĵ garnajoj, kies sigelo estis ankoraŭ netuŝita. Zorgeme oni malligis la ŝnurojn, kaj la pordoj malfirmiĝis, por malkovri trian ŝrankon, havanta similan ornamaĵon kiel la du aliaj, plene kovrita per oro, fermita per eboriglilo, la sigelo iom alia ol la ĝenerala mortsigelo de l' reĝo, kiu montras la blazonon de l' reĝo Tut-Ank-Amon kaj ŝakalon triumfantan super siaj malamikoj.

Sur la pordo vidigis, skulptitaj en la oron, multaj strangaj figuroj de dioj de l' hadeso. Ce ĉiu sinekvanta ŝranko la oro estis pli klara kaj pli hela, kaj, ĉar la pordoj, sekvantaj unu la alian restis malferritaj kaj iliaj internaj flankoj same estis orumitaj kiel la eksteraj, la aspekto estis brilega, grandioza, preskaŭ blindumiganta en sia efiko.

Ankoraŭfoje oni retiris la riglilojn kaj dis-tranĉis la blazonŝnuron, tiam estis malferritaj la pordoj de l' tria ŝranko, videbligantaj kvaran ŝrankon, kiu ankaŭ estas de el oro, sed jam nur pli brilanta ol la tria. Ankaŭ ĉi tie rigliloj de ebono, sed neniam sigeloj. Nun estis inter ni kaj la koro de la tombo nur ankoraŭ la pordoj, kiuj montris la figurojn de la ŝirmidinoj, la gardistinoj ĉe la tombo. La granda momento estis alveninta kaj ni ĉiuj atendis kun streĉeco.

La rigliloj de la lasta pordo estis flanken-ŝovataj; malrapide malferrigiĝis la pordoklapoj, kaj ekvidigis, pleningante la tutan spacon post la kvara ŝranko kaj barante ĉiun plupason, kolosa sarkofago de kristalklara sabloŝtono, netuŝita, la kovrilo ankoraŭ sur ĝia loko.

Ce la anguloj, plastik-reliefe, modlitaj troviĝis la figuroj de la kvar ŝirmidinoj Isis, Nephthys, Neith kaj Selk, skulptitaj el la ŝtono de la sarkofago kaj etendantaj brakojn kaj flugilojn super la flankoj de l' sarkofago. La ĉeflanko montras enskribojn kun la blazono de l' reĝo, certigante, ke ĝi estas lia tombo, kaj ke interne de la sarkofago ripozas liaj mortecaj restaĵoj.

La eminenta kaj admirinda laboraĵo, la belega maniero de la ornamo kaj de la skulptaĵo, la radiant brilego de la oraj pordoj kaj de la

vandoj de la diversaj ŝrankoj, ĉio tio kunfandiĝis en grandioza impresio, pligata per la mistera lumo, kiun la elektra reflektoro post ni elradis super la scenon. Ĉiuj duboj forigis. Ni vidis la veran sarkofago en kiu ripozas la reĝo, kaj pri tio ni nun devas esti kontentaj ĝis plue. Ne estas eble, levi la kovrilon, ĝis kiam la ŝrankoj mem estos forigitaj, kaj tio povas ankoraŭ daŭri longan tempon. Sed pri unu estu la mondo trankvila. Kiam la kovrilo estos levata kaj la mumio de la reĝo estos ĝenata en sia ripozo, tiam la elfosistoj egos kiom eble plej piece, kaj post la scienca esploro la korpo reestos en la tombon, post tie ripozi en paco.

Esperantigis Joh. Bernhard, München.

Babilado de vojaĝanta esperantisto.

Legantoj kiuj malofte vojaĝas tra aliaj landoj kaj formas stajn impresojn pri la nuntempaj kondiĉoj de aliaj landoj nur per legado, eble interesiĝos pri la sekvanta simpla senornama rakonto.

* * *

Miaj negocaj aferoj foriris min en la 5 dec. de mia familio en Liverpool. Mi vagadis ĝis la 22 dec. kaj trapasis kvar landojn: Holandon, Germanujon, Pollandon, Ĉeĥoslovakion kaj hejmen denove tra Germanujo, Holando. Mia pasporto portis por tiu sola vojaĝo kvin konsulajn vizojn, ir-kaj reirajn, kiuj efektive signifis dek. Mi pagis sole por la vizoj £ 7. 1. 0. sterlingojn, krom la kosto de la pasporto mem. En veturado mem, vaporsipe kaj vagonare, mi elspezis precize 129 horojn el mia valorplena vivo, ne enkalkulante la droŝkojn kaj veturilojn en la diversaj urboj. Mi nur veturis kvar noktojn, du sursipe kaj du vagonare. Mi laboris dum la vojaĝo en London, Berlin, Lodz, Warszawa, Praha, Teplitz, Asch kaj Chemnitz kaj ankaŭ pasigis unu tagon en Kraków por rigardi la urbon de la Deka. Mi uzis kvin

okazis en Ilijč Uljanov. Li nur dediĉis sian laboron al la revolucia ideo, estis arestata, deportata al Siberio, ekspatriigita, revenis dum la revolucio de 1907, devis rifugiĝi pro ĝia malsukceso, poste vivis en Svisujo sub la pseŭdonimo Lenin kaj revenis Ruslandon post la ruiniĝo de la imperiestra Rusujo en 1917. Li estis grandega gvidanto kun fera laborpovo. Eminentna rusa romanverkisto foje diris pri li: ludu al li sonaton de Beehoven, montru al li portreton de Rembrandi, deklamu al li versojn de Dante — ĉio ĉi tio estas malgravetaj al li, ĉar ili ne havas rilatojn al la klasbatalo aŭ la potenco de l' proletario. La plej bruta krimo, la plej ardega ekstaziĝo de la homa animo al li estas faktaj sen iu persona signifo. La personeco estas al li nenio, la klasintereso kaj la batalo tamen por ili estas ĉio al li.

R. Kr.

La telegraf-oficejoj komunikas, ke la soveto de Petrograd decidis de nun nomi la urbon honore al Lenin Leningrad.

Historio.
Oslo.

De post venonta 1925 jaro la norvega ĉefurbo ne plu estas nomata Kristiania, sed ricevas sian malnovan nomon Oslo.

La historio de Kristiania-Oslo estas jena. Fondita en 1050, la urbo estis komence sidejo de la episkopo kaj tia ĝi restis ĝis 1397, kiam ĝi estis elektita kiel ĉefurbo de l' reĝlando. La ekonomia signifo de la urbo restis tamen sufiĉe sensignifa, ĉar ĝi ne povis konkurenci kun la riĉaj Hanso-urboj, centroj de tiama komerco kaj industrio. Post disfalo de l' Hanso, komence de 16-a jarcento, la komerco de la urbo rimarkeble ekvigliĝis. La plua disflorado tamen estis baldaŭ nuligita: granda brulo, okazinta en 1624, tiom ruinigis la urbon, ke la reĝo Christian IV de Danujo, al kiu tiutempe apartenis Norvegujo, decidis ne rekonstrui la urbon samloke, sed novkonstrui ĝin aliloke, sur alia bordo de l' fiordo. La nova Oslo ricevis nomon Kristiania je la honoro de ĝia novkonstruinto.

Konsiderante la nomon ofendiga rememorajo pri la tempoj de fremdula jugo estis nun decidite reuzi la malnovan, historian nomon Oslo.

Diversaĵoj.

Nova „Monte Carlo“?

Laŭ sciigoj el Ateno la franca sindikato proponis al la registaro vendi al ĝi la „Achilleion“, la konfiskitan kastelon de la estinta germana imperiestro en Korfo, en kiu ĝi estas aranĝanta novan hazardludejon, la duan „Monte Carlo“.

La profitemaj aferistoj penas konsentigi la registaron per grandaj procentaĵoj de la enspezoj kaj monhelpoj al rifuĝintoj el la malgranda Azio.

El nuntempa vivo en Germanujo.

Pri originala inflacio raportas la „Hannov. Courier“. En unu el la vilaĝoj de la Holstein'a distrikto Pinneberg estis starigita karuselo kies

diversajn valutojn, parolis kvar lingvojn krom Esp., kiu mi uzis en ĉiu lando kaj upbo.

Nur du landlimojn mi povis trapasi komferte sen elvagoniĝo, je la aliaj dekunu landlimoj, ĉar mi devis trapasi entute dektri, mi estis devigita elvagoniĝi aŭ elŝipiĝi kaj submetiĝi al la zorga atento de la diversaj doganistoj. Ĉi tie mi devis pagi tributon al la aŭtokratro de la diversaj doganejoj. Depost la milito Eŭropo ŝajne jam fariis ioman progreson en direkto de saneco. La doganisto ne plu eljetas ĉion el la kofro, kiel estis farita ĝis antaŭ nelonge, li nur entrempas sian manon en la kofron inter la postukoj, kolumoj, ĉemizoj kaj ŝtrumpoj, pinĉas la diversajn artikolojn kaj tuj la afero estas finita. Ŝajnas kvazaŭ la registaroj pagas al tiuj dogan-officistoj nur por ekscii la kvaliton de la vestaro de la vojaĝanto. Elirante tamen el landoj kun malbona valuto ili precipe serĉas bonvalutan monon kaj valorpaperojn.

La usona dolaro regas supere en la mez-eŭropaj landoj. Ĉiu adoras la dolaron kaj sin klinas al ĝia majesteco. La angla funto venas poste en honoro. Mi havas nenian dubon ke en la ŝrumpoj de tiuj landoj kaj en la cirkuladaj sin trovas pli da dolaroj ol en Usono mem. Kia katastrofo povus okazi al la dolaro se ĉiu persono en tiuj landoj unuanime decidus unu tagon vendi la dolaron! La usona trezorejo devas esti antaŭvidema tiurilate.

Estas strange por la vojaĝisto rimarki kiel la bona dio precize dividis la landojn kaj tute konformas aŭ akordas kun la politikistoj kiuj subskribis la pactraktaton. Jen ni forlasas unu landlimon de lando en kiu troviĝas abundeco da nutraĵoj kaj ĉio sub la suno, ni eniras en alian landon post kelkminuta veturado, ŝajne trans simpla landlimo, kie ho ve, ĉio mankas, 80% de la loĝantaro ne havas sufiĉe da pano, ĝiaj senlaboruloj ricevas 2,40 or-mk. posemajne. Denove kelkhora vojaĝo, kaj ni eniras en alian landon; rilate al la lasta ĝi estas Edeno. Bona kolbaso, bona butero kaj sufiĉe da sukero kaj pano blanka.

posedante fiksita la veturprezon en funtoj da terpomoj aŭ respektiva kvanto da rapoj.

Baldaŭ junularo alportis tiom da rapoj, ke la kurzo de tiu „mono“ rapide falis kaj sole la terpomoj estis konsiderataj kiel firma „valuto“.

Internacia sporto.

Pri la 1000-kilometra ski-kurado.

Pluaj sciigoj, ricevita de l' moskvaĵ gazojoj pri la ski-marŝo estas: La 4. 1. la skiantoj atingis urbon Karpopol, trapasinte la plej facilan por ĝiaj severaj naturaj kondiĉoj kaj maldensa loĝantaro etapon kaj eniris en la limon de Volodga gubernio sin direktis al Bieloozersk. La meza potaĝo rapideco estas 50–60 km. Estas trapasitaj jam ĉ. 550 km., do, iom pli ol 1/3 de la tuta vojo. La humoro de l' partoprenantoj, malgraŭ ĉiuj malhelpaĵoj travivita, estas vigla.

R. Lorentson, Tallinn.

Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciigojn (sur postkato aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administrat' aŭ privataj sciigoj) pri ĉiu novaĵo el l' Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj)

Aŭstralio.

La reveno de s-o Drummond kaŭzis grandan ĝojon al la Melbourne Esp.-Klubo, kies prezidanto li estas. Estis entuziasma kunveno ĉe la Oriental Hotel. La vintro ĝardeno de tiu bela konstruaĵo estis plena de internaciuloj, kiuj bonvenis gesinjorojn Drummond. Aŭdiĝis belaj esp. kantoj.

Ankaŭ publika kunveno propagando estis bona sukceso. La ges-oj donis honajn impresojn pri siaj spertoj ĉe la XV-a kaj ankaŭ pri la disvastiĝo de Esp. tra Eŭropo.

La gazojoj raportas pri sukcesplena vojaĝo de la aŭstraliaj delegitoj.

Eŭropo.

Franujo.

Du kursoj en Javidy (apud Paris). Kursoj en Montchal (Loire) kaj Montyeau (Haute Garonne). La grupo de Clermont-Ferrand enhavas 60 membrojn. La honora prezidanto estas la direktoro de la Supera Komerca Lernejo.

Germanujo.

Breslau. Laŭ novaj elektoj estas: 1. prez. s-o Selten (konata el la blindul-movado) 2. prez. s-o Freund, kas. f-lino Menzel, sekr. f-lino Wolfson. Dum la lasta jaro estas faritaj en la kunveno 12 paroladoj, parte kun bildoj, pleie kun viglaj postaj diskutoj. En sept. komenciĝis grupa kurso, ankoraŭ daŭranta sub la gvidado de s-o Habelkow; komenca partoprenantaro 18, post kelkaj lecionoj 27 personoj.

Euskirchen. Post fino de unua kurso, gvidita de UEA-del. supera telegrafa sekr. E. Kind, grupo „Obstine antaŭen“ estas fondita la 21 jan. Aligis 10 membroj. Prez. s-o Kind, kas. f-lino Wolf. La grupo kunvenos ĉiun lundon je la oka vespere en la „Gesellehaus“ (submajstra domo), Ringstr., Euskirchen. Dua kurso komenciĝis.

Friedrichsthal (Saarteritorio). Dimanĉe, 20 jan. okazis ĉi tie la 3-a kunveno de la nove fondita ELSo (Esperanto-Ligo Saarteritoria). Samtempe aranĝis la loka grupo riĉevahan ekspozicion de esp. literaturo kaj gazetoj, kiu incitis grandan intereson de la vizitantoj. La prezidanto de la Ligo s-o Krämer bonvenigis la multnombro apartajn ges-anojn kaj donis la parolon al s-o Omilor (St. Ingbert) kiu bone parolis pri esp.-ismo. Poste parolis s-o Schenkel el Friedrichsthal pri esp. literaturo kaj gazetoj.

La duan parton de la kunveno oni dediĉis al la amuzo.

N. D.

Hispanujo.

Barcelona. La 21 jan. la grupo „Barcelona Stelo“ malfermis kurson sub la gvidado de nia s-ano N. Antoni Durà Martinez kun sukcesa rezultato.

Arta aranĝo de iu stranga kontrolisto de la sortoj de nacioj!

Germanujo estas la lando en kiu la vivkostoj estas nuntempe la plej altaj, poste venas Holando, Anglujo, Ĉeĥoslovakio kaj Polujo. Estas rimarkinde kiel la sortoj revertebligis dum la lastaj monatoj. La apudlima loĝantaro trans la germana landlimo ne plu iras Germanujon por aĉeti bonvalorajojn tie, estas nun la vico de la germanoj iri ĉiutage trans la limon en Ĉeĥoslovakion kaj Holandon por fari aĉetaĵojn. Pano kiu kostas en Germanujo 0.70 pfeniĝojn orajn, kostas nur duonon de tiu sumo en la aliaj landoj, kaj same rilatas al aliaj necesoj.

Ĝenerale parolante oni trovas ke la nova ordo en Mezeŭropo estas multe pli malbona ol la malnova, eĉ en Ĉeĥoslovakio, kie bona ordo ekzistas kaj kies mono estas bone stabiligita, la laboristoj plendas ke ilia nuntempa laborgajno ne sufiĉas por akiri la antaŭmilitan staton de vivo.

Esperantaĵoj.

Kaj nun pli intimaj novaĵoj, kiu koncernas nian movadon. Ju pli multe oni vojaĝas des pli multe oni ekirovas la disvastiĝon de Esperanto kaj ĝian utiligeblecon. Jam en Holando mi salutis verdstelan ĉefkonduktoron Verschoof tuj post la elŝipiĝo. En Berlin mi hazarde renkontis esperantiston en la stacidomo. En Warszawa mi renkontis la lokan pormonumentan komitato pri kies kunveno mi verkos apartan artikolon. Enirante en la vagonon en Lodz survoje Ĉeĥoslovakion iu juna homo ekvidinte mian stelon alparolis min en flua Esperanto kaj eksciinte ke mi estas alilandulo oferis al mi sian servon survoje. En Krakov la Vic. Del. de UEA akompanis min tra la urbo kaj kune kun entuziasma f-lino la tiea instruistino de la esp. kursoj travivadis min la interesajn partojn de la urbo kaj ne permesis ke mi restu soleca eĉ ĝis 2,20 matene, je kiu horo mi devis envagoniĝi por mia vojaĝo; vere samideana oferedo. En Praha mi vizitis nian vigan kaj entuziasman

Nia talenta pioniro Jaume Grau Casas inaŭguris ĝin, parolante verve kaj irate dum unu horo antaŭ novlernantoj, kiuj aŭskultis kun granda intereso liajn parolojn. La ĉeestantoj longe aplaudis la parolanton.

A. Dura.

Vaska lando.

Bilbao. Nuntempe estas ĉi tie entuziasmo por Esp. Funkcias tri kursojn kun proksimume 45 glerantuloj.

— La festo okaze de la datreveno de l' naskiĝo de nia Majstro bonege sukcesis. Tiun tagon okazis paroladoj de niaj ŝatataj s-anoj s-oj De Allende, Icaza (Pedro), Elexano, Lunate kaj Muro (blinda s-ano).

La lastan tagon de l' ĵus finita jaro okazis grupa kunsido por elekti la novan komitaton por la nuna jaro. Elektitaj estas s-oi: Prez. Juan José Larrea, vicprez. Juan Gracia, sekr. Feliks Jausoro, kas. Eugenio Herrera, voĉdonantoj: Manuel de Elexano, Luis de Otaola kaj Alberto Diaz.

— La loka gazeto bone akceptas tradukitajn artikolojn de ET kaj Esperanto de UEA.

Italujo.

Mantova. La 15 jan. okazis la kunsido por la renovigo de la estraro kaj la fikso de la laborplano de 1924. Nuna estraro estas: Prez. Fiori Giuseppe, sekr. kaj kas. Zaccheo Fernando, Morfini Gerardo, del. de UEA kaj FEI, bibliotekisto kaj korespondanto D-o Sapa Francesco, konsiliaĵoj Fusato Giuseppe, Raini Francesco, Toni Umberto kaj Filino Ferrari Bice.

Liguria. La Spezia. La lokan UEA-delegat'on kaj la prezidanton de la urba grupo vizitis dum la lastaj tagoj de dec. angla s-ano s-o James Leakey el Haslede. Ĉiam kaj nur parolante per nia lingvo la nomita s-ano kaj liaj familuloj pasigis plej agreblu du tagojn kaj du vesperadon, admirante samtempe ĉu la tre vigran sanecon kaj envindan malnunecon de la 74-jara angla vizitanto, ĉu lian fervoran plenan je spirito kaj agemo por nia ideo. Nun la esp.-istoj de La Spezia deziras publike danki la tre afablan s-on Leakey por lia vizito kaj lia neforgesbla gajeco kaj simpatia kunrestado datage.

— Sabaton, 5 jan. s-o inĝeniero Luigi Gagnotto, malnova kaj serioza esp.-isto, publike paroladis pri „Esp. kaj ĝia nuntempa disvolvigo“. La parolado, kies iniciatinto estis la loka Komerca Cambio ĉiam tre afable favora al esp. instruo kaj movado, tre bone sukcesis. Oni disdonis senpage kelkajn dekojn da lernolibroj kaj flugfolioj, propagandiloj ktp. — La librovendisto Zaccuti, kiu simpatias kun nia movado, vendis rapide kelkajn dekojn da lernolibroj. La urbanaro simpatias: neniu kritikis la revikiĝintan Esp. movadon.

— La 10 jan. la loka Komerca Cambio malfermis libervolan kurson, kiun gvidas s-ano R. Oregno, membro de Itala Katodro de Esp. Partoprenas 14 glerantuloj. La kurso serioze daŭras. Specialan dankon meritas D-o Valenti, sekr. de la loka Komerca Cambio, kiu plej afable favoras la movadon.

Siracusa. Je la novjaro 1924 la Sicilia Katolika Esp. Delegacio presis novan esp. revuon, itolitan „Ciel-flojoj“.

— Tiu revuo estas tre konsilinda al la eksterlandanoj dezirantaj sin ekzerci en la legado kaj elparolado de itala lingvo. Jarabonoj por landanoj £ 3, por eksterlandanoj £ 6 aŭ 6-foje la kosto por afranko de ordinara letero al eksterlando laŭ nacia tarifo. Oni turnu sin al la redakcio de Ciel-flojoj: Siracusa (Italujo) Prof. Luizo Scata.

Jugoslavo.

Zem un. Fondiĝis Esp-grupo. Adreso: Br. Rajsiĉ fotografisto.

Rusujo.

Ekkunciis sesa esp.-ista rondeto ĉe komunista ĉelo de la oficejo „Gubfnoidel“. Esp. lernas 17 personoj (komunistoj). Gvidas s-ano B. Dzetoieckiĝ.

— Esp-ista ekspozicio ĉe la klubo de 5 okt. estas fermita kun bona sukceso. Ĝin vizitis pli ol 400 personoj. Poste ekkunciis nova esp. kurso, gvidata de s-o Sarioĉev.

— La sama ekspozicio estas transportita en alian klubon de „Leŭtenanto Ŝmido“ kaj ankaŭ tie ĉi ĝi estas bone vizitata.

En loka gazeto „Komunisto“ estis anonco pri malfermo de la ekspozicio ĉe la klubo „Leŭtenanto Ŝmido“.

kunlaboranton s-on Pitlik, la nuna direktoro de la nove fondita Esp. Instituto kun kiu mi diskutis landan kaj esperantan politikon. En Teplitz mi vizitis kaj manpremis la Delegiton de UEA. En Franzensbad mi haltis speciale por alrigardi la faman monumenton al la Majstro, sed ho ve, tie atendis min la unua senluzaĝo. La bona franzenbadanoj ŝajne amas siajn publikajn monumentojn, kiujn ili dirlotas kiel infanoj. Dum la vintra sezono ili ĉirkaŭvolvas la monumentojn per varmaj vindadoj por ŝirmi ilin kontraŭ la naturaj elementoj. Komprenble la Majstra monumento ricevas la saman amegan prizorgon kaj tiaj miaj sopirantaj okuloj ne povis ĝin ekvidi. Mi staris antaŭ la envolvida monumento kun respekto kaj ĉagreno, levis mian ĉapelon al ĝia internajo, metis atunatan folion al ĝiaj piedoj kaj foriris por kapti la proksiman vagonaron.

Fine mi devas reveni momente al mia vizito en Warszawa kaj revoki kun plezuro la grandan afablecon al mi de la Majstro-edzino. Si ne permesis ke mi serĉu hotelon kaj insistis esti mia gastiganto. La du tagoj, kiujn mi pasigis tie, estis por mi veraj hejmejoj. Vera hejmo for de mia propra hejmo en plena senco de la vorto. Komforton, pairnamon kaj amikecon mi ĝuis en tiu sankta atmosfero inter la muroj, kie vivis kaj laboris nia Majstro. Ĉi tie mi permesis al mi transdoni al la esperantistaro tion kion la Majstro-familio, en sia modesteco, kredas esti tute sen intereso al la esperantistoj, kaj kion mi kredas tamen tre interesa.

Unue ke f-lino D-o Sofie, la filino de la Majstro, kiu perdis ĝin en Sovetlando post la revolucio por kelkaj jaroj, nuntempe denove troviĝas en Warszawa je la ĝojo de sia patrino. Due ke D-o Felix Zamenhof, la filo de la Majstro, antaŭ nelonge edziĝis, kun ĉarma junulino ankaŭ kuracistino, kiu ne nur parolas esperante sed ankaŭ angle kaj france tre flue. Ĉiu leganto de miaj linioj levu la glason je la tre proksima okazo kaj trinku la sanon kaj feliĉon de la juna pareto.

J. D. Applebaum, Liverpool.

Ĉe la lernejo „Politehnikum“ kaj ĉe la klubo de „Leŭtenanto Ŝmid“ estas skribataj muraj gazetoj. En ili estas ankaŭ skribataj presierataj artikoloj. En la lasta oni ĉe uzas esperantolingvajn artikolojn. *B. Averin.*

Cerepovec. Esp-ista movado en nia urbo komenciĝis eniri en la vivon de lokaj sportistoj. Agema esp-ista sportisto Paŭlo Prokopjev, str. Socialistiĉeskaia, 75 li estas dividanto de esp. movado inter la sportistoj.

Familia grupo laboras. Baldaŭ okazos 4-a praktika kunveno.

Novaj grupoj ekzistas en Sojvolovskoja Fabriko, stacio Eŭlimovskoja kaj vilaĝo Absekanovo.

Al la adreso de gvidanto de Esp. movado en Cerepovec s-o A. P. Drozdov venis korespondanto por loka ĵurnalo rusa-nacia de angla esp-isto s-o Charles G. Stuart-Menteth el London, kiu okazigis grandan intereson en la redakcio de loka gazeto „Komunisto“ ekinteresiĝinte la redaktorojn kaj la oficistojn. Estas deziro, lerni Esp. Vardado komenciĝas laŭ subskriblistoj.

Pra graveco de esp. movado inter sportistoj en Cerepovec, s-o Paŭlo Prokopjev petas la esp-istajn sportistojn, sendi al li siajn skribaĵojn, por komenci la inter-korespondadon pri la sporto. *A. R.*

la multnombrom. Zorgu per sindona propagando, ke Esperanto enradikiĝu ĉiam pli profunde en la junularo! Interesigu ankaŭ la plenaĝulojn, kiuj estas la ekonomie pli fortaj, por ke ili subteni nian organizaĵon per financa helpo!

La estonteco ĉion atentus de la junularo ankaŭ en Esperantujo!

Asocio de Junaj Germanaj Esperantistoj.
Kurt Hornung, sekr.

Helpu al la germanaj infanoj.

La L. G. Koblenz de GEA kun kora danko konfirmas la ricevon de 10 svd kr. de s-ino S. Bostrom, Gelle (Svedujo). Volonte ĝi perados pliajn donacojn. Adr.: L. Funken (UEA n-o 20190), Florinsmarkt 7a, Koblenz, Germanujo.

Ni serĉas diligentan kompostiston

kiu sufiĉe scipovas Esperanton, por la kompostado de ET kaj de aliaj esperantaj presaĵoj.

Presejo de „Esperanto Triumfonta“, Horrem b. Köln, Germanujo.

„La kvinjaro de Sovetlando“-luka albomblibro pri Kvinjara ekzistado de la Sovetaj Respublikoj. 80-paĝa, 70 ilustraĵoj. Trad. V. Polakov, Aĉelcebia ĉe Centra Komitato de Sovetlanda Esperantista Ligo (Mosko-Rusujo, PK. No. 680). Prezo por malbonvalva 1 sv. frk., mezvalva 1 sv. frk., bonvalva 5 sv. frk. Por afranko oni aldona 100/1. La libro estas sendata post antaŭpago per monbiletoj stabilvalutaj en rekomendataj lertoj. [1]

Korespondado kaj Interŝanĝo.

S-o M. Wieremieck, pocza Snow, p. v. Nowagro Rieko, folv. Tarekji, Polujo, deziras korespondi k. ĉ. l. per k. ankaŭ por mono kaj pm. nepre kaj tuj respondo. [2]

S-o Walter Liebert, Oststrasse 140, Göppersdorf/Burgstr. (Saksujo), Germanlando, deziras interŝanĝi pm. kaj papermonon. [2]

Fervora esp-isto deziras korespondi kun itumondo. Interŝanĝas esperantaĵojn kaj papermonon. S-o O. Sierig, Magdeburg, Wilhelm Kobeltstr. 16, Germanlando. [2]

Mi deziras korespondi pri „Esperanto kiel kulturakela komprenigo“ kun seriozaj ĝejnuloj de la tuta mondo. Fraŭlo Ernst Werner, Wien 17, Schullthesgasse 3, Aŭstrio. [2]

S-o A. P. Drozdov, Karl-Liebnechtstr. 25, Cerepovec, Rusujo, deziras korespondi kun ges-anoj de la tuta mondo, krom Rusujo, pri la evoluo de l' mondo, religio, esp-ismo kaj sperta grupovivado. Prefaras scienculojn. [2]

S-o E. Desch, popollerneja rektor., Homberg (Niederrhein), Feldstr. 22, Germanujo, deziras korespondi kun ges-anoj, speciale samoficianoj ĉiulandaj pri nacia vivo kaj pri lernejoj kaj fakaj demandoj. [2]

Mi deziras libere korespondi per leteroj aŭ pk. kun gaboristoj pri: Pro kio kaj por kio ni vivas. Ne interŝanĝas pm John Grönberg, Cobalt, Ont. Box 648, Kanado. [2]

S-o Edgars Blinš, Gertrudus iela 48, dz. 21, Riga, Latvio, deziras korespondi kun tuta mondo per bona il. pk. kaj l. Al ĉi eksterŝanĝo sendos belan latvan il. revuon. [1]

Mi deziras interŝanĝi kun ĉiulandanoj pm., papermonoj kaj il. pk. Mi respondas al ĉiuj kaj ĉiam. Lasz-o Erno, Kaposvar, Mikszath utca 1, Hungarujo. [2]

Cegrupanoj, inter ili fotografistoj, deziras korespondi per il. pk. kaj l. interŝanĝi originalajn peizaĵfotografiojn, pm. papermonoj k. ĉ. l. ĉefe Nederlando kaj Danujo. Adreso: Vilhelmo Bleier, Uŭpest, Virag-ut. 9, 2c, Hungarujo. [2]

S-o Leŭtenanto Arturo Vilches, str. Thompson 141, Bahía Blanca, Argentino, deziras interŝanĝi pm. (ne sendu bagatelojn). [2]

So Vincenzo Orlando, str. Santa Fe 77, Bahía Blanca, Argentino, pm. (nur kun fraŭlinoj). [2]

4-500 malsaman pm. mi sendas kontraŭ sama kvanto de via lando. Ankaŭ mi kolektas neilustritajn pk. Skribu la adreŝon bone legeble. Mi certe respondos. Mi ankaŭ povas sendi papermonon germanan. E. Lenzbauer, München, Georgenstr. 62/2 r., Germanujo. [2]

Por 1 dolaro (aŭ samvalora mono) mi donas 50-100 pm. (ne kaj stampitaĵojn). Bonvole registru sendaĵojn! H. Wolschmitt, Klezestr. 99/1, München, Germanujo. [2]

La Esp. grupo Kreuznach, Germanujo, deziras por ĝiaj letervesperoj korespondi kun esp. grupoj kaj esp-istoj el ĉiuj landoj. Skribaĵoj petataj ĝis plej malfrue la 1. marto al Deutscher Esperanto Bund, Ortsgruppe Kreuznach, Germanujo. Ni respondas al ĉiuj. [2]

S-oj Laz. Abramović, ul. Aktiabrjskoj Revolucij 1, Taganroj (antaŭe en Boku, Azerbajdĝano) informas siajn korespondantojn pri nova adreso. Por daŭra vojaĝado multaj korespondadoj povos nur esti respondataj post kelka tempo. Li petas daŭrigi la korespondadon. [1]

Papermonojn por kolektoj mi deziras el Germanujo, Rusujo, Ukrainio, Polujo, Aŭstrio kaj Hungarujo kontraŭ pago. Adreso: „Trans-Oriente“, strada C. A. Rosetti 3, Bucaresti, Rumanujo. [1]

Filatelistoj en London! atent! Mi donos multe da seriozaj de polaj aŭstriaj kaj sovetaĵoj pm. al tiu, kiu elserĉos kaj skribos al mi adreŝon de mia bofrato en London. Lia nomo Mendel Bloch, cirk. 45. l., li estas en Anglujo jam 15-18 jaroj, li alvertis el Rusujo. — Leon Ringler, „Premier“, Polska-Borsylava, Polujo. [1]

S-o Michelo Forsiner, Landshut (Bav.), Germanujo, Bahnhofsstr. 25, serĉas gekorespondantojn el ĉiuj landoj. Li preferas temojn pri natur-scienco, filozofio kaj parencaj fakoj. Li ĉiam respondos. [1]

Mi deziras vendi aŭ interŝanĝi multajn librojn, ĵurnalojn, revuojn kiujn mi havas duoble en mia biblioteko. Inter ili: plena kolekto de la Revuo „Zamenhofaj verkoj“ aŭ tradukoj ktp. Listo kaj prezoj kontraŭ respondukopono. E. Deligny, del. UEA, 4, rue Allent, St. Omer, (P. de C. Franĉio). [1]

Junaj fraŭlino, 20 jara deziras interŝanĝi kun la tiamondaj pl. bonaj pm. kaj panoramkartojn. Minna Hoder, Trautemau, Reichsstr. 67, Ĉeĥoslovakio. [1]

S-o Germ. Michiels, instruisto-studento. Staatsnormaalschool, Gent (Belgiujo) deziras korespondi kun la tuta mondo per Pk, kaj Pm. [1]

S-o Arthur Vermisser, instruisto-studento, Ledeganckstr. 8, Gent, Belgiujo, deziras korespondi kun la tuta mondo per Pm., Pk. kaj L. [1]

Naj junaj Esperantistoj (15-16 jara) deziras interŝanĝi il. Pk. kun eksterlandaj gesamiceanoj, Adreŝu al F-lino Bl. Geers, Sint Jobsstraat 63, Antwerpen, Belgiujo. [1]

S-o A. Hamelin, Rembrandtstrat 71, Haga, Nederlando, deziras korespondi per L. kaj interŝanĝi Pm., precipe: Rusujo, Svedujo, Bulgarujo, ankaŭ il. Pk. [1]

Filatelistoj! Kiu sendas al mi de 50-250 pm. ricevas saman kvanton de Polujo, Litovio, Rusujo kaj Silezio. Adreso Daniel Sztajman, Radom, Lubelska 50, Polujo. Respondo certa! [1]

Du fraŭloj, Jozefo Hegert kaj Emeriko Medvezsky, Colmar, rue Rapp 13, Franĉujo, deziras korespondi per il. Pk. k. ĉ. l. gesamiceanoj. [1]

Fraŭlo 19 jara deziras korespondi per L. Pk., kolektadi papermonon Pm. librojn sciencajn ktp. S. Miguel Dalmau, str. Brasil 24, Sans (Barcelona), Hispanujo. [1]

Esperantisto serĉas korespondadon kun ĉiuj landoj, prefera kongresojn vizioniajn de Wien. Werner Rentmeister, Wien 5, Köllingasse 10. [1]

S-o Hermann Pfaffel, librenistino, Landshut (Bav.) Germanujo, Alstadt 390, 2. deziras korespondi pri ĉiuj temoj, precipe natur-filozofio kaj naturscienco. Laboristoj estas preferataj. Li ĉiam respondos. [1]

Korespondemuloj! Germana junulo deziras interŝanĝi kun ĝejnuloj de eksterlando, precipe kun ino. August Spürkel, Horrem b. Köln, Hindenburgstr. 22, Germ. [1]

S-o Erich Hums, oficisto, Körnerstr. 11, Oelsnitz, Vogtland, German., deziras interŝanĝi pm. kun la tuta mondo. Mi donas bonajn pm. Respondas tuj. [2]

Filatelistoj! Por 2 sviz. frk. aŭ egala valoro mi sendas 30 div. malofitajn poŝmarkojn de la liberŝtato Danzig. Interŝanĝas pm. Oskar Köhler, Ölpnitz i. Vogt., Bergstr. 3. [1]

Du honor-tagoj!

Du fervoraj, fame konataj batalantoj por nia afero denove travivas sian honortagon. Ambaŭ apartenas, por tiel diri, al la maljuna gvardio, al la aro da pioniroj, batalintoj por la unuaj sukcesoj de Esperanto.

La 30. januaro

s-o Generalo Sebert, Paris, fariĝas 85 jara.

La 2. februaro

s-ino Marie Hankel, Dresden, fariĝas 80 jara.

Ni povas admiri la laborplenan vivon de du famuloj en nia movado, kies nomoj estas enskribitaj en la oran libron de la historio de Esperanto.

Sufiĉe konataj estas la detaloj el la vivo de Generalo Sebert. Post brila militista kariero, dum kiu li jam akiris famon por sciencaj laboroj, li dediĉis sian laborforton ekskluzive al industriaj kaj sciencaj laboroj. Kiel ano de arego da kulturaj entreprenoj en- kaj eksterlandaj li fariĝis komandoro de la honora legio kaj oficiro de Publika Instruado. En 1898 li konatiĝis al Esperanto kaj de post tiam senlace laboris por nia afero. Konata estas lia fondo de la ankoraŭ nun ekzistanta Centra Oficejo Esperantista en Paris, kies kostojn li ĉiam prenis sur sin. Ĝis eksplodo de la mond milito li ĉestis ĉiujn universalajn kongresojn krom Washington kaj Krakov. Ankoraŭ nun li estas membro de preskaŭ ĉiuj institucioj de nia movado. Neniu grandskala okazintaĵo en nia movado okazis sen li. Nun jam de kelka tempo li ne plu tiel oficiale partoprenas al niaj laboroj, sed lia aktiveco tamen ne ĉesis. Decas memori pri liaj penadoj por la progreso de Esperanto. La esperantistaro dankeme gratulas lin je lia honortago, dezirante al li ankoraŭ dum longa tempo ĉiun akirindan feliĉon.

Marie Hankel de post 1906 laboras nelacigeble por nia afero. Neniu esperantisto, iam vizitinte la urbon Dresden, ne konas ŝin, la ĉiam afablan samideaninon. Ŝi estas ano de la Lingva Komitato. Ŝi partoprenis ĉiujn universalajn kongresojn de la 3-a de Cambridge ĝis la 9-a de Bern kaj sole la maljunaĝo malhelpis al ŝi ankaŭ viziti la sekvintajn. Ŝi estis unu el la kunorganizantoj de la kongreso de Dresden. En la kongreso de Barcelona ŝi estas kronita kiel „florregino“. En aĝo de 66 jaroj ŝi ankoraŭ kuragiĝis vojaĝi al la kongreso de Washington. Multaj gazetoj ŝatas ŝin ankoraŭ nun kiel kunlaborantinon. Fame konataj estas ŝiaj literaturaĵoj. Ankoraŭ nun ŝi estras la Esperantistajn Literaturajn Asociojn, kies fondintino ŝi estas. Ŝi ankaŭ apartenas al tiuj malmultaj personoj, kiuj havis la honoron gastigi nian majstron D-on Zamenhof. Ankoraŭ nun ŝi partoprenas aktive je nia movado.

Ankaŭ ŝin la tuta esperantistaro gratulas elkore, dezirante, ke ankoraŭ longtempe ŝi restu inter ni en korpa kaj spirita freŝeco.

Asocio de Junaj Germanaj Esperantistoj.

Sekretario: Kurt Hornung, Auerbach/Vogtl., Köblingsstr. 9. Poŝteka konto Dresden 50644 (Hugo Gerisch, Auerbach/Vogtl.)

Esperantista Junularo!

Je la 2a Asocia Tago de la junaj germanaj esperantistoj dum la Nürnberg Kongreso la gvidado de la aferoj estis transdonita de Breslau al la subskribita grupo de Auerbach, Vogtlando. En tiel grava tempo kiel la nuna, ĝi akceptis la oficon, ĉar la ekonomia mizero malakcelas la progreson de la mondlingva ideo. Spite de tiuj malfavoraj cirkonstancoj precipe la junularo ne devas flanke stari por ke nia afero venku. Urge necesa estas la kolekto de ĉiuj fortaj. La nombro de la esperantiemuloj atingas certe la multoplon de tiuj, kiuj estas vere aliĝintaj al la Asocio. Sed ĉu tio konvenas dum tempo en kiu sole la kooperativa ideo promesas sukceson? Tial ni postulas senkonatiĝe: Ĉu junaj Esperantistoj germana ĝis nun ne apartenanta al la Asocio, enira tuj kiel membro! Kaj kie pluraj kanestaj samloke, oni fardu lokan grupon, elektu diligentan kaj anonca la aliĝon! Grupoj jam aliĝintaj sendu tuj membrolistojn! Nur tiamaniere ni atingas proksimume ekzaktan rezulton pri la ĝisnuna esperantistaro; kaj tio estas kondiĉo por forta kaj firma organizaĵo (zolituloj, Loka Grupo, Distrikto, Asocio). Neniu diru, ke la aferoj estas tro grandaj! Ni intencas demandi la kolizaĵojn tiel malaltajn kiel eble, nur tiom kiom ni bezonas por la organizaĵo. (Zolituloj, grupoj: 1 ormarko; eksterordinaraj membroj: 2 ormarkoj. Respondeco ĉi asociano ricevas la gazeton de la Asocio „Esperantista Junularo“.

Junaj esperantistoj, helpu! Ne pensu: Ho, aliaj ĉion faros! Ni bezonas ĉe la unuopano, ĉar la unuopaj faros

Prezo-redukto!

Favorprezoj por libroj.

Taglibro de vilaĝpedelo

Malriĉa en spirito.

Ĉiu libro kostas provizore nur 0.60 sv. frk. aŭ 0.50 or.-mk. inkluzive sendkostoj. Skribu tuj al

Butin & Jung, G. m. b. H.

Godesberg (Germ.) Bahnhofstr. 30.

Jam aperis Jam aperis

La familio Gerak

de la fama bulgara rakontisto Elin Pelin, tradukita kun permeso de la aŭtoro de Atanas D. Atanasov.

Prezo 14.— Iv. aŭ 2.50 fr. fr. aŭ egalvaloro.

Mendu ĝin ĉe

Esperantista Koopera Societo en Bulgario, str. Maria Luiza 46, Sofia.

La sama societo havigas: „Fratoo“ de Elin Pelin kaj „La Fonto de la Blankpedulino“ de P. R. Slavejkov, ĉiu po du levojn bulg. afrankite 2.50 lv.

Jus estas presata

Eŭropo ĉe la abismo

de

Francesco Nitti

10ma ministrara prezidanto itala

Esperanto-traduko

kun speciala antaŭparolo de la eminenta aŭtoro.

★

Petu prospektojn kaj detalojn kaj sendu antaŭsendaĵojn je favorprezo al

Frankf. Societäts-Druckerei G. m. b. H., Abteilung Buchverlag, Frankfurt a. M.

Korespondado en Esperanto. - Ilustr. kartoj rifuzotaj.

Anoncetoj.

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĝigo, edziĝo, morto, okazintaĵoj gravaj esp. kunvenoj, festoj k. s.), senp. a. g. e. Aliaj anoncetoj, nur akceptitaj por minimume du sinsekvaj enpresoj, kostas po du enpresoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de 0 k ET-numeroj kontraŭ antaŭpago. Abonantoj, ĉe kiuj ni povas depreni la pagon de la abonkonto, ĝuas por propra laŭ anoncetoj preferan prezon de kvin ET-numeroj. Germanaj pagaĵoj 2.-mk., prefera prezo por poŝtabonantoj 1.25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

RUSAJ GESAMIDEANOJ! Ĝeparencoj de D-o Vincas Pietaris (Vikentij Petter) morinta dum 1902 en Ustiuŝina, Novgorodskaj gub. serĉas lian familion, edzinon Marija Nikolajevna Petter kaj ĝejnianojn — Georgio, Adolfo, Vikentio, Antonio, Marjolo — kun celo interkonatiĝi. Eksciinte ion pri ŝi il. il. bonvolu skribi al Kl. Naŭdžius, Mariampole, Litovio. [2]

Mi DANKAS s-on Charles G. Stuart-Menteth, 51 Lipper Bedford Place en London (Anglujo), por absidenta esp. artikolo por loka nacia ĵurnalo, kiu estas empresota. La ĵurnalo oni sendos al vi. S-o A. P. Drozdov, Karl-Liebnechtstr. 25, Cerepovec, Rusujo. [2]

LERTA FOTOGRAFISTA HELPANTO, 18 jara, kun bona atesto, serĉas postenon longe daŭran en la lando parolante esperantan, hungaran, slovakan kaj germanan lingvojn. Perantoj estos nur pagataj post la efektiviĝo. Adreso: Ludoviko Löwinger, fotografisto, Nové-Zámky, Ĉeĥoslovakio. [2]

BANKOFICISTO, 24 jara (germ.), deziras oficon alilande (banko, grandfirmao). Laŭdaj atestoĵoj fakaj scioj diverslingvaj. — Ges-anoj, peradi! (elspezoj repagotaj). Pruvu praktikecon esperanian! — Esp.-grupo, por UEA 20190, Florinsmarkt 7a, Koblenz, Germanlando. [2]